**N I A V O Ĉ O**

# Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MAJO 2001**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto

## HISPANIO

Esperantistoj de la Esperantista Societo de **Tenerife** prelegis pri Esperanto en la 3-a Universitata Kurso de Esperanto, en la Universitato de La Laguna. Partoprenis 22 gelernantoj, kiuj atingos 3 oficialajn universitatajn kreditojn, kiuj taŭgos por atingi poste iun ajn universitatan titolon.

La Prezidanto de Kultura Asocio Esperantista, KAE, s-ano José María Galofré Domingo, ankaŭ Vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio ĵus estis koncedita de la Ekscelenca Magistratejo de **Sabadell** ĝian Medalon de Honoro, kiel rekonon kaj rekompencon al lia altnivela laborado por la urbo, dum la lastaj 27 jaroj, pere de liaj respondecaj postenoj en la estraro de diversaj asocioj lokaj, inter ili en tiu de KAE.

## E-LIBROJ EN PUBLIKAJ BIBLIOTEKOJ

Se vi konsultas la paĝon: www.mcu.es/bpe/bpe.html (Publikaj bibliotekoj de Hispanio) vi trovos jenan rezulton por "esperanto". La cifero montras la nombron da libroj en/pri esperanto:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Andalucia | 5 | C.y León | 28** | Madrid | 10 |
| Aragón | 17 * | Cataluña | 7 | Melilla | 1 |
| Asturias | 17 | Co. Valenciana | 15 | Murcia | 9 |
| Baleares | 2 | Extremadura | 2 | País Vasco | 3 |
| Canarias | 4 | Galicia | 36*** | Bibl. Nacional | 106**** |
| Cantabria | 3 | La Rioja | 4 | | |
| C.-La Mancha | 5 | | | | |

* Zaragoza estas la provinco kiu havas plej multe da, probable pro la donaco de Fundación Esperanto.
** La publika biblioteko de Segovio havas PIV-n kaj aliajn, aĉetitaj laŭ sugesto de César Mosteyrín.
*** Inter ili kelkaj jarlibroj de UEA ekde la jaro 1911.
**** Laŭ la vorto "esperanto" aperas kelkaj erare kiuj ne temas pri esperanto.

Ni konsilas al e-grupoj konsulti la TTT-n por sia regiono kaj provinco kaj donaci almenaŭ du librojn al la ĉefa biblioteko (lernolibron kaj informlibron).

## RADIO POLONIA

E-Redakcio de Radio Polonia disaŭdigas sian elsendon je la 13.30 h (laŭ la Universala Tempo) (41 m =7285, 7275 kHz) kun la ripetoj je 18.00 h (42.07 m. = 7130 kHz), 19.00 h (nur satelite) kaj la sekvan tagon je 08.30 h nur per satelito. (Ripeto de la programo aŭdiĝinta la antaŭan tagon). Post la ripeto je la 8.30 la elsendo estas aŭdebla en ret-versio. Por aŭskulti ĝin laŭ la hispana tempo necesas alkalkuli du horon, ekzemple 13.30 + 2 h = 15.30

La satelita ricevo estas ebla per: Eutelsat II F - 6 - Hot Bird - 13 gradoj de la orienta latitudo; frekfenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. La adreso por retaj auxskultantoj: http://www.wrn.org/ondemand/poland.html

Jam de pli ol 40 jaroj esperantlingvaj elsendoj de Pola Radio kreas la ĉiutagan esperantan lingvomedion, de kelkaj lastaj jaroj tiu ĉi lingvomedio dank' al la interreto estas tutmonda!

**ESPERANTO EN "INTERNET"**

La plej malnova el ĉiuj aperantaj Esperanto-revuoj, "Espero Katolika", estas nun en la reto:
http://www.ikue.org/arkivo/ek11_12_00.pdf
Vi povas konsulti la kurson de Esperanto "Pedro Nuez" en la jena interreta paĝo:
www.ishove.com/guillem

| | | |
|---|---|---|
| **NIA VOĈO** | **MAJO 2001** | 1999 |

**HEF ANGULO**

NOVA TTT-PAĜO DE HEF: *www.esperanto-es.net*

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.net

**EXPOLINGUA - 2001**

De la 19ª ĝis la 22ª de aprilo funkciis la esperanta stando ene de la tradicia lingvo-foiro en la parko Casa de Campo. Ĉirkaŭ dek homoj organiziĝis laŭvice por deĵori en la stando, kiu grandis 10 m2. Oni montris grandan abundon da libroj, revuoj, diskoj, alilandaj flugfolioj, ktp. Rekte videblis la videokurso Mazi kaj la interreta versio de la fama romaneto La Eta Princo. Pluraj centoj da vizitantoj ŝoke malkovris ke Esperanto ekzistas, mem spertis ĝian facilecon per la "ludo-testo" kaj ricevis propagandan globkrajonon.

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

12-13 majo "Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio kaj Murcio" Alicante

22-30 junio 60-a Kongreso de Hispana Esperanto-Federacio.

| Poŝta Adreso | Telefonoj | Elektronika poŝto |
|---|---|---|
| Coronel Fernández Tudela 65. | 968 570 603 | vsa10001@almez.pntic.mec.es |
| 30730 San Javier (Murcia). | 968 183 338 | |
| | 968 190 588 | |

Pli da informoj en jenaj TTT-paĝoj
www.60kongreso.50megs.com
http://añmez.pntic.mec.es/vsa10001

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Prelegoj:

21-an de majo "Internacia jaro pri lingvoj. Esperanto en Expolingua". M. Parra

18-an de junio "Sicilia, filma insulo". Lumbildoj

**MEL KOTIZO POR 2001**

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj* ***ok*** *jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin* ***sendi ĉekon por 2.250 pesetoj****, je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL.* ***Vi povas pagi rekte al la kasisto en nia kunveno, lunde vespere en Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aû per banko Atlántico je la konto:***

0008 0110 97 1120 404200